

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 4 Aprilo, 2013

*Kara Leganto, post la 100a (malfrua) numero tuj sekvas – jes! – 101, aprila eldono de nia bulteno. Laŭ plano, la jubilea aperigo devus esti pli ol 2-paĝa, sed (ve)... Male, pli optimism, nun ni havas materialojn por la duonjaro. Do, dum 6 monatoj vi konatiĝos kun E-tradukoj de W. Guthrie-aj kantoj fare de K. Fiese (Germanio). Ni komencas publikadon felietone rakonton de J. Andruĥoviĉ pri nia urbo. Agrablan legadon!*  
–La Redakcio



## Ŝikago, 2001

*Jurij (Georgo) Andruĥoviĉ (n. 1960) – fama ukraina verkisto, trakusto, d-ro pri literaturscienco. En 2011 aperis lia libro “Leksikono de Intimaj Urboj” pri III urbojn vizitaj de li. La aŭtoro subtitoligis ĝin kiel “libera lernilo de geopoetiko kaj kosmopolitiko”. Nun estas proponata eseo por lia vizito de Ŝikago en 2011.*  
–Jurij Andruĥoviĉ

Ĉu iam okazis al vi veturi en unu aŭto kun tri Mikaeloj samtempe? Mi unufoje tion spertis, kaj tio ĉi neforgeseblas.


Ĉe la stirilo sidis la unua Mikaelo – tiu, kiun en ĉi libro mi nomas mnm3. La dua Mikaelo estas aktoro, renoma. En tiu vojaĝo, dum la verkistaj kunsidoj li laŭtlegis fragmentojn el “Perverzio”, tradukitaj de la unua Mikaelo. Tie ĉi kaj nun mi nomos lin kiel Miĥal’, sed li tamen estas Mikaelo. La tria estas Michael Stipe, ĉefulo de “R. E. M.”, ĉeestanta nur kiel voĉo.

Al Ŝikago de nia kara Pensilvanio ni veturis preskaŭ dek horojn. Dumvoje Miĥal kelkfoje anstataŭigis ĉe la stirilo mnm3-on, por tiu iom ripozu. Dum ĉi tio Miĥal iel transformiĝis: kapen li surtiris ledan ŝoforan kaskedon, kaj sur manojn – same ledajn kaj same ŝoforajn gantojn. Mi diras nenion pri la nigraj ŝoforaj okulvitroj, same kiel pri la blanka Isadora koltuko. Sed eĉ ne nur koltuko, sed la vera ŝalego. Tuj fariĝis klare, ke la homo estas sperta kaj ne unufoje sortobatita.

En Ŝikago ni pasigis du noktojn kaj, estinte tute plezurigitaj de tiu fantastika urbo kaj de si mem, je tagmezo de la tria tago ni ekveturis pluen – al Urbano-Ŝampajno. Rakonto pri ĝi forestos en tiu ĉi libro.

Dank’al mnm3 ni sukcesis kun la loĝejo. Tio estas – kun ĝia lokiĝo, en la norda Ŝikago, sur Dearborne-strato, je kelkaj ŝtupoj de la laga bordo kaj ial meze inter Goethe kaj Schiller stratoj, kvazaŭ ni reale trovis sin ne en Ŝikagon, sed en iu Vajmaro, Dachau aŭ Eisenach. Finfine, eĉ numero de la domo, kie ni noktumis, estas diversflanke atentinda: 1331.

Kaj jen de tie, de la domo n-ro 1331, al la ĉefpordego



de kiu je la tagmezo de la tria tago mnm3 aligis nian prunteprenitan “ford-cherokee”-on, al Urbano-Ŝampajno estas nur de 140 ĝis 160 mejloj, t.e. iuj du kun duono – tri horoj da veturo, ĉiam suden, kaj iom okcidenten. Kaj ĉar nia sekvanta PerVersion spektaklo devos komenci en la menciita Urbano je la sesa vespere, ni povis permesi al ni tiun ĉi luksaĵon – eki ne pli frue, ol la unua. Ni faris tiel. Kurante antaŭen mi diru, se ni ekveturus duonhoron pli frue, ĉi rakonto ne aperus.

Sed dekomence ĉio okazis tute ne malbone. Ni forveturis, kiel devas esti, en direkton de Lake Shore Drive kaj ekis suden je sonoj de radio-ricevilo.

Tiun tagon radiostacio infomis ĝenerale pri du eventoj: pri tio, ke Sloba Miloŝeviĉ, subite kaptita en anticipe donita al li loĝejo, estis finfine fordonita de jugoslavoj al Okcidento, kaj pri eldono de la nova unukanta disko de “R. E. M.” – “Imitation Of Life”. Nome de tiu ĉi momento en la aŭto aperis tria Mikaelo, tio estas, voĉo de la tria Mikaelo. Mi memoras, kiel min ĝojis ambaŭ novaĵoj. Kvankam la dua tamen pli, ĉar proksimiĝis

apero de la nova ro’em’o-a albumo “Reveal”. Nu kuregis per aŭto laŭlonge de lago Miŝigano, printempo jam estis transpasanta la mezon de Marto, kaj ĉiuj radiostacioj elsendis “Imitadon de vivo” (“Imitation of Life”), kvankam de parolist-anoncoj mi ŝajne aŭdis “Invitadon al vivo” – nu, vere, sen Antoniĉ okazas nenion. Nome la vivo invitis min kaj ĉiujn vivi plu.

Se vi delonge ne aŭskultis aŭ ne memoras ĉi kanton, nepre reaŭskultu ĝin. Mi apenaŭ saltis dum ĝia sonado sur la malantaŭa sidloko de la buseto... –Elukrainigis Araneo

## El Leterkesto

Saluton, geamikoj el Usono!!!

Mi nomiĝas Fábio Monteiro kaj aĝas 34 jarojn. Mi estas brazila ĵurnalisto kaj Esperanta aktivulo, kiu unufoje partoprenis en NASK kaj en la Usona Kongreso de Esperanto ĉi-jare. Pro tio, nuntempe mi organizas mian

vojaĝon kaj restadon en Usono... Post la koncernaj E-eventoj, mi intencas resti en Usono dum unu aŭ du monatoj, precipe por studi la anglan lingvon, por turismi iomete tra la lando, kaj kompreneble por profiti la mirindajn oportunojn, kiujn Esperanto donacas al ni. Pro tio, mi petas helpeton al vi ĉiuj! ☺

Mi volus ekscii pri tio: en kiuj urboj mi trovas organizatajn E-grupojn kaj eblajn E-gastejojn? Mi vologus restadi ĉe Esperantistoj en Usono! Por mi, ne gravas ĉu la urbo estas granda aŭ malgranda, ĉu la grupo estas junaĝa aŭ maljunaĝa, ĉu la vetero estas varma aŭ malvarma... Laŭ mi, pli valoras sperti la kulturan interŝanĝon pere de Esperanto.



Jen mia vizaĝo

Mia dezirata vojaĝplano estas: unue, mi iros al urbo Raleigh (ĉefurbo de Nord-Karolino), kie okazos NASK kaj la nacia kongreso. Poste, mi ŝatus resti dum pli-malpli unu monato en iu urbo, kie mi povas studi la anglan ĉe somera aŭ intensa kurso. Post tio, mi volus vojaĝi al du aŭ tri malsamaj regionoj por simple turismi, tiokaze mi restados en tiuj urboj nur dum kelkaj tagoj. Poste mi revenos al mia brazila hejmo probable tre feliĉa!

Se vi povas kaj volas gastigi eksterlandan esperantiston (tre simpatian!), do bonvole respondu ĉi-mesaĝon! Se vi ne povas, tamen konas alian Esperantiston kiu povas, do bv resendu ĉi-mesaĝon al li aŭ ŝi. Mi kredas ke ju pli frue oni organizas itineron, des pli bone la vojaĝo konkretiĝos. Mi anticipas elkore dankas al ĉiuj helpantoj!

Kompreneble, mi respondecas pri miaj elspezoj, mi ankaŭ pretas helpi en la hejmaj taskoj, kaj mi povas zorgi pri mia propra manĝaĵo. Specifajn kondiĉojn de la gastiganto ni certe povas interkonsenti. Nature kaj volonte, iu ajn kunlaboro ĉe Esperantaj kluboj, asocioj aŭ kursoj estas tre bonvena por mi!

Mi anticipas dankas pro via atento. Kaj mi esperas konatiĝi persone kun vi dum NASK kaj dum la Usona Kongreso de Esperanto. Amike, **Fabjo Monteiro** ~ fabjomonteiro@hotmail.com

## Woody Guthrie en Esperanto (2)

En Wikipedia (germana paĝo) ni trovas, ke multaj tragedioj trafis lin jam en juneco. Tre grava estis la malsano de lia patrino. Ŝi suferis pro terura 'Huntington-malsano', kiu estas nekuracebla. En la lasta jarcento la homoj ne bone komprenis tiun malsanon. Estas hereda malsano, kiu montras sin, kiam la pacientoj estas plenkreskuloj multfoje dum la 30-a kaj 40-a jaro kaj ankaŭ Woody Guthrie estis malsantrafita. Li mortis en la jaro 1967.

En tiu konekso la giganta verko de Woody Guthrie estas eksterordinara! Mi nur povas rekomendi al vi de tempo al tempo aŭskulti la belegan, ofte tre melankolian muzikon. Plejofte la kantotekstoj havas seriozan enhavon. Ne ĉiam estas facile digestebla 'nutraĵo', sed tiajn kantojn mi ne elektis. Kaj preskaŭ ĉiam oni rimarkas la socian engaĝiĝon de W. Guthrie. Necesas, ke oni komprenu la tekstojn, sed ne ĉiam la tiamaĵn cirkonstancojn estas konataj nun.

Post la aŭskultado de kelkaj kantoj mi baldaŭ komencis 'produkti' esperantlingvajn versiojn. Pardonu min se mi ne ĉiam bone sukcesis. Mi bezonas la helpon de aliaj Esperantistoj!

Ĝis nun mi traktis ses kantojn, eventuale aperos eĉ multaj versioj, kiu scias?

Sendu al mi viajn plibonigojn por ke Woody Guthrie ankaŭ en Esperantujo povas plu vivi.

—Klaus Friese, Germanio

### Ĉu Mi Mankos al Vi?

*M: Will You Miss Me? (Woody Guthrie)*

Dum la laboro kun miaj esperantaj kantotekstoj mi ja ofte aŭskultis la originalan muzikon de la kompaktdisko. Mi ne povis eviti ke ankaŭ mia kara edzino aŭskultis. Sed la melodion de tiu kanto ŝi tre ŝatis. Post mia klarigo ŝi miris pro la iomete malgaja enhavo. Verŝajne Woody Guthrie esprimis proprajn spertojn kaj sentojn. Mi komprenas ke per la paciĝema melodio oni povas ricevi konsolon.

En horo de la morto  
haltiĝas mia kor'  
Iam ja mi estos for

Ĉu mi mankos mankos mankos al vi  
Ĉu mi mankos mankos se mi estos for  
Se mi iam estos for?

Venu kaj sidiĝu al mi  
Ĵus apud ĉe mia lit'

Tuŝu mian fronton mane  
Kiam velkas mia viv'

Ĉu mi mankos mankos mankos al vi  
Ĉu mi mankos mankos se mi estos for  
Se mi iam estos for?

Ĉu mi mankos mankos mankos al vi  
Ĉu mi mankos mankos se mi estos for  
Se mi iam estos for?

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Anonimulo  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**  
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**  
**Kunvenoj komenciĝas**  
**je 7 p.t. en la Suda**  
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Aprilo – Prezidanta horo

28an de Majo – Redaktora horo:  
100 numeroj de "Saluton!"

16an de Junio – Tradicia E-pikniko